Profesoro Mitio Nagumo nakiĝis la 7-an de majo 1905 en Tokio. Fininte la lernadon en la Unua Mezlernejo de la Gubernio Tokio kaj poste en la Unua Nacia Kolegio li eniris en la Universitaton de Tokio, de kiu li gradiĝis en la jaro 1928. Post la gradiĝo li eniris en la Post-gradiĝan Lernejon de la sama universitato kaj studis sub la gvido de Prof. Yosie la teorion de diferencialaj ekvacioj kaj debutis en la matematika rondo per distingita papero pri la unikeco de la solvo de diferencialaj ekvacioj.

En marto 1931 li fariĝis docento de la Universitato de Kyusyu, kaj en oktobro de la sama jaro li transiĝis al la Universitato de Hiroshima. En marto 1932 li iris al Germanujo kiel eksterlanda esploranto de la Ministerio de Edukado kaj daŭrigis sian studadon de diferencialaj ekvacioj en la Universitato de Göttingen.

Reveninte al Japanujo en marto 1934, li fariĝis docento de la Universitato de Osaka kaj poste ĝia asistoprofesoro en septembro de la sama jaro. Li estis promociita 1936 al profesoro de la sama universitato kaj restas ĝis nun ĉe tiu posteno.

En la jaro 1937 li ricevis de la Universitato de Tokio la titolon de doktoro de sciencoj.

Li iris al Brazilo en majo 1960 laŭ invito de la Federacio kaj restis tie ĝis majo 1961 kiel gastoprofesoro de la Universitato de Rio Grande do Sul.

Ankaŭ li multe kontribuis al la kreskigo de la Divizio de Funkcialaj Ekvacioj de la Japana Matematika Societo. Kunlabore kun Prof. Hukuhara li fondis la organon "Funkcialaj Ekvacioj" kaj estas ĝis nun ĝia redaktoro.